

# Heroldo de HEL

N-ro 120

Augusto 2008

HOKKAJDA ESPERANTO-LIGO

北海道エスペラント連盟

ĉe HOŠIDA Acuŝi

〒053-0844 苫小牧市

Miyanomori 2-18-18, TOMAKOMAI

宮の森町2丁目18-18

053-0844 JAPANIO

星田 淳 方

TEL-FAKS:0144-74-2539

Retadreso:hosidaacusi@kir.biglobe.ne.jp

Postgirkonto (郵便振替) : 02700-6-17075

\*Sekretario: SATOO Eiji

\*事務局: 佐藤英治

N-ro 45, Simin-Katudō-Sapōto-Sentā

〒060-0808 札幌市北区

Sapporo L-Plaza 2F, Kita 8 Nisi 3

北8条西3丁目札幌エルプラザ

Kita-ku, Sapporo, 060-0808 Japanio

市民活動サポートセンター レターケースNo. 45

TEL(pos):090-2054-8751

TEL-FAKS:0144-58-2174

Retadreso : helano88@ka2.so-net.ne.jp

\*TTT-ejo : <http://www5d.biglobe.ne.jp/hel/jp/index-j.htm>

## [Enhavo/目次]

- 表紙、Enhavo/目次 P. 1
- Okazos la 72a Kongreso de Esperanto en septembro P. 2  
第72回北海道エスペラント大会のご案内/HEL
- Informi kaj ekspozicii pri niaj agadoj/Sapporo-L-Plaza P. 3  
「おハコとばねる」団体活動発表・紹介展
- Raporto pri mia travivaĵo rilate al la 93a UK en Roterdamo(1) P. 4  
第93回世界エスペラント大会 取り急ぎの報告/Tsubaki Shouichi
- Pintanoj venis sur pinton. Civitanoj venis sur ebenon. P. 5  
Kunsidoj de NRO-j en Sapporo dum la Pinta Konferenco G8  
apud la lago Tōya-ko[toojako] /頂上会議は山の上 市民会議は  
地べたの上 北海道洞爺湖サミットと市民サミット/樺山 裕介
- Por la memoro de mia amiko s-ro S P. 8  
/Sさんのおもいで/KAWAI Yuka
- 「先住民族サミット」アイヌモシリ2008について P. 9  
Pri la pinta konferenco por indigenaj popoloj en  
Ajnumosir (Hokkajdo) 2008/YOKOYAMA Hiroyuki/横山裕之
- LA OLDULO kaj LA MARO/老人と海/原作 Earnest Hemingway P.13  
/Esp. 訳 Fernando de Diego/和訳 後藤 義治
- Danke ricevitaj -受領郵便物- (星田淳 扱い) P.18
- [第7回委員会報告] Protokolo de la 5-a Komitata Kunsido P.19
- [編集後記/Redaktanto parolas ...] P.20

第72回北海道エスペラント大会 の ご案内

HEL/北海道エスペラント連盟

今年の大会は次のように行われます。多くの方の参加を待っています。

- ・日時：9月13日(土) 13時 ~ 9月14日(日) 17時
- ・開催場所：北海道旅客鉄道株式会社社員研修センター  
〒065-0005 札幌市東区北5条東10丁目 (次頁に地図)
- ・苗穂駅から徒歩13分、東12丁目バス停から徒歩7分、札幌駅からタクシー10分
- ・参加費： 3000円、 不在参加2000円  
(当日支払いまたは 郵便振替 02700-6-17075 へ)
- ・主催者：北海道エスペラント連盟
- ・連絡先：委員長：053-0844 苫小牧市宮の森町2-18-18 星田 淳  
TEL-FAX:0144-74-2539, メール: hosidaacusi@kir.biglobe.ne.jp  
事務局：TEL-FAX:0144-58-2174,  
メール: helano88@ka2.so-net.ne.jp

・宿泊、食事

上記研修センターで受け付けます。

Tel (011) 711-2228 Fax (011) 721-6661

宿泊(1泊3500円)、食事(1食520~1370円)、電話で2日以上前に「北海道エスペラント連盟」と名乗って予約してください。

・概略プログラム

第1日 9月13日(土)

国際言語年・アイヌ民族先住民決議(国会)記念講演会(一般公開)

13時 開場 受付開始

13時30分 講演 アイヌ語ペンクラブ会長 野本久栄さん

エスペランチスト側からの講演者も予定します。

16時(頃) 閉会

18時 Bankedo : 近くのレストランを予定。会費は実費

第2日 9月14日(日)

9時 開場 受付開始

9時30分 北海道エスペラント連盟 年次総会

休憩時間に 歌、紙芝居など だしもの歓迎

昼食をはさんで 午後閉会と予定しています。

閉会后HELの新年度第1回委員会を行います。



Raporto pri mia travivaĵo rilate al la 93a UK en Roterdamo (1)

第93回世界エスペラント大会 (ロッテルダム) 取り急ぎの報告

Tsubaki, Shouichi

北海道からただ1人(?) 参加した椿さん、Amasloĝejoの係がエスペラントを話せず領収書も読めず、コンピュータで支払済を確認する体たらくに驚き、横浜UKとはずいぶん違う、とあきれたとのこと。----- La Red.

De la 19a ĝis la 26a de la lasta monato(julio) okazis la jubilea (cent-jariĝo ekde la fondo de UEA) UK, en kiu mi partoprenis ĉi-foje ŝajne sola el Hokkajdo.

Por mi ankaŭ estis unuafoje planigi al mi sola vojaĝi eksterlanden kaj eble sukcese tion fari, ĉar ĉiam ajn mi vojaĝis tien, mia financa ministr(in)o akompanis min. Mi konfesas, ke mi estis senkapabla iel ajn elspezi monon por mi mem aŭ aliaj aferoj sen mia edzino.

Fakte, mi tamen veturis al Roterdamo kiel unu el la karavananoj de JEI. Sed estas unu afero, pri kiu mi volus iomete fieri; mi tranoktis la unuajn kvar noktojn en amasloĝejo nomata 'Mafkees'. Kvankam mi spertis amasloĝejon ankaŭ okaze de Jokohama UK lastsomere, ĉi tiu kazo estis tute alia ol tiu de Roterdamo:

Tiea ĝiĉetistino ne parolis Esperanton nek komprenis min aŭskultinte: pro tio mi devis paroli la anglan lingvon. Kaj des malpli agrabla sento devis sekvi min. Ŝi postulis de mi la loĝkotizon, malgraŭ tio, ke mi montris al ŝi la pag-atestilon senditan de la CO de UEA. Kompreneble ŝi ne povintis legi ĝian enhavaĵon. Se unuvorte, ŝi estis nenia esperantisto, kia mi dezirus ŝin trovi. Sed post mia iom forta insistado en la angla, ŝi denove pli detale konsultis la komputilon, ŝi finfine konfirmis mian pagitaĵon, kaj kondukis min al la ĉambrego kun sia tro da ĝentileco se ne diri tian ŝian harar(et)stilon tre eksterordinaran, kia aspektis kiel kokokresto(mi ne scias, kiel nomiĝas tia hararango). Efektive ŝi estas bonkora junulino, kvankam ŝi estas maldekstregemulino laŭ la mencio de sia konato, kiu ankaŭ laboris tie. Post tio, felice por mi nenia problemo plu okazis kaj povis ĝui (mal?)avantaĝon de la loĝejo.

Enirinte la grandegan ĉambregon, mi estis tuj alparolata de iu mezaĝulo, kies lito estis apud la mia. Alparolata per Esperanto?

Ne, ankoraŭ ne estis klare. Sendube devus aŭdebliĝi nia lingvo,

mi supozis. Mi atente aŭskutis al li. Jes, li paroladis plej-versajne Esperante (aŭ esperante), ke mi komprenu lin. Sed lia akĉento estis tio sufiĉe forta, ke ĝi malhelpis al mi trovi lin parolanta Esperanton pli frue ol trovi lin ĉina.

Kaj poste nia interparolado daŭris per kaj Esperanto kaj ĉinaj ideogramoj sentese... ĝis nia deviga enlitighoro. Ver-dire mi ne povas ne admiri lian aktivecon ĉiam pretigi al li alparoli iun ajn eĉ per sia ne jam evoluinta Esperantajo.

Kompare kun la amasloĝejo en Jokohamo, tiu en Roterdamo almenaŭ havas du meritojn, pri kiuj mi devas nepre mencii:

Oni donas matenmanĝon; por mi, kiel sparemulo, eblus preni duoblan porcion da nutraĵoj, se mi ne dikiĝus pro tio. Kion, do, mi faris el tia avantaĝo? Mi tamen nuntempe ne deziras mencii pri tio.

La amasloĝejo situas multe pli proksime al la kongresejo. Oni povas surpiede atingi ĝin en 15-20 minutoj.

Sekvan tagon sabate kiel kutime mi ial tre frue vekigis, tamen spite hor-diferencon je 7 horoj disde la japana tempo.

Post kiam mi prenis sufiĉe ne nur longan sed ankaŭ grandkvantan matenmanĝon, mi ekiris al la kongresejo kune kun la germana samĉambrulo, kiu flue parolis Esperanton kaj ĉiĉeroniĝis por mi survoje al ĝi.

Kio kaj kiuj atendas min en la kongresejo? Mi iomete streĉis mian kuraĝon. (daŭrigota)

\*\*\*\*\*

Pintanoj venis sur pinton. Civitanoj venis sur ebenon.

Kunsidoj de NRO-j en Satporo dum la Pinta Konferenco G8 apud la lago

Tōya-ko[toojako]

頂上会議は山の上 市民会議は地べたの上

北海道洞爺湖サミットと市民サミット

KABAYAMA yūsuke 樺山 裕介

Ĉiu scias, ke okazis ĉi-jara Pinta Konferenco en Hokkajdo(\*1) 7-9an de julio. Ne nur la Grupo de la Ok (G8) sed ankaŭ multaj landaj gvidantoj (ekzemple :Ĉinio, Barato, Brazilo) kolektigis en izolitan hotelon sur montorondo ĉirkaŭanta belan lagon. Tio ŝajnas malgrandigitaj Unuiĝintaj Nacioj.

G8 estas rigardata kiel simbolo de Tutmondiĝo (angle : Globalization),

kiu riĉigas riĉulojn kaj malriĉigas malriĉulojn en la tuta mondo. Kvankam mi malamas Tutmondigon por malmultaj riĉaj, mi opiniis, ke ĉiujara Pinta Konferenco ne kulpas, ĉar ĝi ŝajnas nura ceremonio kaj pri Tutmondigo, kulpas alilokaj kaŝitaj kunlaboroj de internaciaj organizoj, unuopaj kompanioj, la usona registaro kaj ĝiaj amikoj. Tial mi pretervidis la okazontajon nevarme. En Eŭropo multaj civitanoj protestis batale kontraŭ ĝi. Sed en Japanio ne estis tiel. Multaj ne kutimiĝis al la vorto Globalization, eĉ malrapide malriĉiĝante pro ĝi. Eĉ bonveniga kampanjo ŝaumis ie-tie. Kune la vorto "Eko(-logio)" ofte aperis ie-tie, ĉar la temo de la kunsido estas "la ekologio de la terglobo". Ne-Registaraj Organizoj (NRO-j) en/ekster Hokkajdo planis sian alternativan konferencon. Samtempe ainoj(\*2) planis indiĝenan konferencon. Ambaŭ invitis multajn alilandanojn. Ili okazigis kelkajn lernajn eventojn prepare.

La Pinta Kunveno de G8 komenciĝis en la "kastelo en la ĉielo" for de popolo. Manifestacian marŝon kontraŭ G8 akompanis multegaj policianoj, kies sceno rememorigas la sanktfajran kuradon de la Pekinaj Olimpikoj ekster Ĉinio. Iuj estis arestitaj dum sia marŝo pro nura uzo de sonmaŝino sur vagono. Kvankam ĉiu neniam uzis, uzus kaj uzos perforton por protesto, iuj, el kiuj estas ĵurnalisto, estis malakceptita ĉe la eniro en Japanio.

Faktas, ke la rajto de esprimo estis difektita.

Samtempe civitanaj konferencoj komenciĝis kun multaj programeroj sur la tero. Unuj en Sapporo(\*3), kaj la indiĝena en la vilaĝo Nibutani en la provinco Hidaka. Iuj iris al la loko proksima al Tōya-ko por rekta protestado. Mi aligis al kelkaj programeroj en Sapporo. Parolantoj parolis pri aktualaj maljustaĵoj en sia lando. Kameruniano parolis pri konstruo de petrola konduk-tubo, kiu donas profiton ne al loĝantoj sed al alilanda firmao. Unuspecigo de kulturajaro por potenca firmao invadas Filipinojn.

La kompanio Union Carbide, kies industruejo eksplodis ŝutante kemiaĵojn kaj kaŭzis mortojn de multe da popolo en Bhopal, Barato, sukcese forkuris je sia kompenso fordonante sian tuton al alia kompanio Dow Chemical. Dow Chemical asertas, ke ĝi ne heredis respondecon pri tio. Ankoraŭ nun multaj loĝantoj suferas. Tia estas la nuna monda sistemo "liberigata". Sur budoj abundis multaj eldonajoj de NRO-j. Iuj proponas alfiksadon de

imposto al internacia investo. Iuj proponas nei la pagon de peza ŝuldo sekvanta de "alpremita" monprunto.

Miaj impresoj.

1. Regas la angla lingvo en la mondo de NRO-j. Kroma interpreto estis nur por la korea lingvo.
2. Ne nur la pintanoj sed ankaŭ anoj de NRO-j indiferentemas pri la danĝero de (ege pli venena) nuklea radiaĵo, dum ili arde diskutas pri (malpli venena) karbona duoksido, kiel kaŭzo de vairmiĝo de la terglobo.
3. Antaŭe ĵurnaloj kaj televidaj programeroj traktis kontraŭ-G8-emajn movojn malŝate. Laŭtempe ili simpatiemigis iomen kaj iomen.
4. La nomon "Ainumoshiri", kies signifo estas ajnua(=homa) lando, oni multe uzis anstataŭ/kun la nomo "Hokkaido". La lastan programeron fermis fotado kun voko per la aina lingvo.
5. La Monda Banko, Internacia Monda Fonduso kaj Monda Negoca Organizo (World Trade Organization, WTO) estas ege malamataj. (menciindas ke al Tôya-ko venis ankaŭ la prezidento de la Monda Banko : Robert Bruce Zoellick, usonano.)

Tiel nomata Tutmondiĝo ne estas tutmondiĝo sed usoniĝo, ĉar Usono neniam igas sin konvena al mondskala demokratia interkonsento sed igas aliajn konvenaj al si. Eble la regnoj de BRIC (Brazilo, Rusio, Bararo (angle India), Ĉinio) progresos plu kaj plu, sed en iliaj landoj tiu progreso profitos nur riĉuloj laŭ la modelo de Usono. (Nur la prezidento de Brazilo, ankaŭ kiu venis al Tôya-ko, Luiz Inac' io Lula da Silva, aspektas al mi demokratieca persono.)

Esperanto deziras esti demokratia tutmonda lingvo kontraŭ la usonigo al la mondo pri lingva hierarkio. Kiel ni rilatos al ekster la Esperantujo? Mi rememoras unu scenon de UK en Jokohamo. S-ro Jose' Antonio Vergara el Ĉilio, gravulo de UEA, bojis, ke esperantistoj revidas kaj intersalutas sincere, jam sufiĉe, rilatu kun ekstero!

Kiel vi pensas?

Rimarkoj de la red.

(\*1) : La verkinto uzas "Hokajdo", laŭ PIV.

(\*2) : La verkinto uzas "ajnuoj".

(\*3) : La verkinto uzas "Satporo", laŭ etimologia praformo en la aina.

Por la memoro de mia amiko s-ro S  
Sさんの おもいで

KAWAI Yuka

「あなたは私を再生させてくれました」－学生時代エスペラントに誘ってくれた彼の柩に入れた感謝の言葉－ 昨年の日本大会の記念品『Esperanto Kaj Mi』よりの転載です。--- La red.

Renkonto al E estas la plej grava kaj dankinda hazardo en mia ĝisnuna 35-jara vivo. La kialon mi skribu sube.

Ekziston de E mi jam konis en mia lernanteco. Tamen, ĝis mi aktuale ek-lernis ĝin, pasis ĉirkaŭ 10 jaroj. En mia studenteco mi fariĝis kritikanto de lingvo-imperiismo, t.e. hegemonio de la angla lingvo en la mondo. Mi konkludis, ke E estas la plej justa solvo. Sed mi ne sciis, kiamaniere mi memlernu.

En aŭtuno kaj vintro studentoj de mia fako - arbara ekologio - estis relative liberaj. Iun tagon de oktobro en 1994, s-ro S, unu el samfakuloj, demandis min, "Ĉu vi konas E-n?" Mi respondis, "Nur la ekziston mi konas. Sed neniam mi lernis ĝin." S-ro S vigliĝinte diris, "Mi antaŭe prove lernis, sed ĉesis. Do, se vi havas intereson, ni kune lernu E-n." Mi tuj jesis! Tiel mi eklernis E-n kune kun s-ro S per "E en Kvar Semajnoj".

Bedaŭrinde, en sekvanta aprilo s-ro S forlasis la universitaton kaj fariĝis insturisto de agronomia altlernejo. Sed feliĉe, mi aniĝis al JEI kaj daŭre ricevis ĝian organon "La Revuo Orienta". Pere de ĝi mi konatiĝis kun multaj samideanoj. Mi kelkfoje rekomendis, ke ankaŭ s-ro S estu membro de iu rondo, sed li ne konsentis, ĉar en ĉiuj semajnfinoj li estis okupita pro gvidado de volebala klubo.

Post kelkaj jaroj, alia eksa samfakulo sciigis al mi, ke s-ro S amis min kaj kredis ke la plej efika rimedo naskigi amon en mia koro al li estos lerni kune ion strangan. Mi ridegis! Mi tute ne rimarkis lian kaŝitan intencon dum nia kunlernado.

Antaŭ 2 jaroj li forpasis tute subite. En lian ĉerkon mi enmetis mallongan mesaĝon; "Vi donis al mi ree la vivon". Tio ne estis troigo. Ekd 1994 ĝis nun, precipe ĝis 2004, mi suferas pro depresio. Entute 4 jarojn mi restis en hospitalo. Dum tiu senperspektiva periodo, E subtenis mian koron. Pro mia malsano mi ne povis akiri ordinaran laboron kaj fariĝis tradukisto. Maloportuneco de tiu ĉi okupo estas malofta ŝanco por konatiĝi kun iuj novaj. Tamen dank' al E, mi havas multajn amikojn. Tial mi multe dankas s-ron S, kiu gvidis min ĉi tien, kaj E-n. (fino)

「先住民族サミット」アイヌモシリ2008について  
Pri la pinta konferenco por indigenaj popoloj en  
Ajnumosir (Hokkajdo) 2008

YOKOYAMA Hiroyuki/横山裕之

G8サミットに先立って、2008年7月1日から4日にかけて、古来アイヌの土地であるこのアイヌモシリ(北海道)に、日本および世界の先住民族が集まり、「先住民族サミット」アイヌモシリ2008が開催されました。

Antaŭ G8 pinta konferenco, ekde la 1-a de julio 2008 ĝis la 4-a, en Ajnumosir (Hokkajdo) kiu estis lando de la indigena popolo ajnuo ekde malnova tempo, la indigenaj popoloj el Japanio kaj aliaj landoj kunvenis, kaj okazis la pinta konferenco por indigenaj popoloj en Ajnumosir (Hokkajdo) 2008.

7月4日に札幌で実施した講演終了後にG8への提言書のコピーが配布されましたので、その内容を紹介したいと思います。

Post la lekcio en la konferenco okazinta en la urbo Sapporo en la 4-a de julio oni disdonis proponajn paperojn al G8. Mi klarigas ĝin.

「先住民族サミット」に参加した先住民族は、アイヌモシリ(北海道)、ウチナ(沖縄)、日本、アメリカ、カナダ、ハワイ、グアム、オーストラリア、バングラデシュ、フィリピン、ノルウェー、メキシコ、グアテマラ、ニカラグア、台湾、アオテアロア(ニュージーランド)など12カ国22民族に及び、平取、二風谷、札幌での参加者はのべ1,500人近くになりました。

La indigenaj popoloj partopreninta en la konferenco estas 22 gentoj de 12 landoj el la regionoj Ajnumosir (Hokkajdo), Uĉina(Okinavo), Japanio, Usono, Kanado, Havajo, Guamo, Aŭstralio, Bangladeŝo, Filipinoj, Norvegio, Meksiko, Aotearoao (Nov-Zelando) kaj aliaj. La partoprenantoj en la urbo Biratori, Nibutani kaj Sapporo fariĝis totale ĉirkaŭ 1500.

先住民族は、世界における自分たちの場所、とりわけ自然と人間との相互関係についての根本的な価値観や考え方を共有しており、それによって一体となっています。

Indigenaj popoloj havas komune radikalan valoron kaj opinion pri rilato inter naturo kaj homo. Do tio kunligas ilin.

このサミットはアイヌの人々が実現したもので、G8サミットに合わせて我々先住民族が集まり、G8が話し合う問題について考え、それがどのように先住民族に関係してくるかを検討するのは今回が初めてです。

La konferenco estis okazigita de ajnua popolo. Kaj indigenaj popoloj kunvenis kun la tempo de G8-Konferenco, intersanĝis opiniojn pri la temoj de G8-Konferenco kaj resumis la aferojn, kiel ĝi rilatas al ili. Tia

konferenco estas la unuafoja.

今回の集いでは、2007年9月13日の先住民族の権利に関する国際連合宣言の採択を祝い、2008年6月6日に参議院と衆議院によって採択され、同じく2008年6月6日に内閣官房長官によって受諾された「アイヌ民族を先住民族と認めることを求める決議」を、アイヌ民族とともに讃えています。

En la konferenco ili gratulis la adopton de 'Deklaracio de Unuigintaj Nacioj (UNoj) pri la Rajto de Indigenaj Popoloj' en la 13-a de septembro 2007 kaj admiris kun ajnua popolo la adopton de 'Rezolucio por agnoski la indigenecon de ajnua popolo' fare de la Ĉambroj de Deputitoj kaj Senatanoj kaj konsentita de japana kabineto.

先住民族は、G8 諸国によって促進される「人類が自然を操り支配できる」という考えに基づいた経済成長規範と近代化は誤りであると考えています。これが、環境変動、世界的食料危機、石油価格高騰を招いた原因となり、貧困や、富ある者となき者の格差を拡大し、平和への道を見えなくするとしてます。

Ili opinias, ke erara estas ekonomia kreska normo kaj modernigo laŭ la penso, ke homaro povas regi naturon. Laŭ ilia opinio, tio estas la kaŭzo de la media sanĝigo, la monda manĝaja krizo kaj la plialtigo de petrola kosto, kaj pliigas malriĉecon kaj la diferencon inter riĉuloj kaj malriĉuloj, kaj kovras la vojon al paco.

提言書には種々の問題をあげていますが、特に言語に関するものをあげます。

Troviĝas diversaj problemoj en la proponaj paperoj al G8, sed ĉi-foje mi klarigas la aferon pri lingvo.

先住民族の持つ市民的、政治的、経済的、文化的、社会的権利への悪質な侵害が継続しており、先住民族に対する人種差別、そして我々独自の言語の使用と文化の実践に対する差別的待遇が継続しており、先住民族としての集団的アイデンティティを承認していないと考えています。

Ili opinias, ke oni malnoble atencadas la civilan, politikan, ekonomian, kulturan kaj socian rajton de indigenaj popoloj, kaj diskriminaciadas la popolojn, la uzon de ilia propra lingvo kaj ilian kulturan agadon, kaj ne agnoskas kolektivian indentecon de indigenaj popoloj.

また、先住民族言語と文化の消滅が増大し、世界の文化的、言語的多様性をさらに減少させていると指摘してます。

Laŭ ilia vidpunkto pliigas malapero de indigenaj lingvoj kaj kulturoj, kaj malpliigas lingva diverseco en la mondo.

G8 への先住民族からの提言の中で、先住民族の価値観は、互いへの敬意、母なる地球への敬意、そして全ての生命体への敬意に基づくとしてます。

En la propono al G8 ili skribas, ke ilia valortaksado estas bazita sur respekto al aliaj, patrineca terglobo kaj tuta vivajo.

彼らの宇宙観と哲学、伝統的な暮らし、持続可能な消費手段、生き方は、持続可能な世界に繋がる最も効果的な道筋であると考えています。

Ili pensas, ke la plej efika vojo al daŭrigebla mondo estas ilia koncepto de la universo, filozofio, tradicia vivo, daŭrigebla konsumada rimedo kaj vivmaniero.

極度に商業化、個別化された消費・個人主義的な世界の中で、彼らの価値観は本来それらに取って代わるものとして、先住民族のためだけではなく、その他全ての人類のための、指針となりうるにも関わらず、主流から排除されているとします。

Kaj en la mondo komsuma kaj individua ekstreme komercigita kaj apartigita, kvankam ilia valortaksado povus fariĝi la gvidilo ne nur por ili sed por la tuta homaro, sed ĝi estas ignorata de la mondo.

G8に21項目の実行の提言があります。15条の実行は言語に関するものです。

Troviĝas la propono de 21 agadoj al G8. La 15-a agado estas prilingva jene.

先住民族共同体においてさらなる文化センターや博物館設立へ支援を提供し、多文化教育、バイリンガル教育、先住民族の伝統的な口承教授法を含む学習ならびに教育方法の利用、先住民族言語を教授する言語プログラムの促進する教育機関やプログラムの設立に支援を提供するように提言しています。

Al ilia komunumo oni donu plie kulturajn centrojn, subtenojn pri fondo de muzeo, uzadojn de multkultura edukado, multlingva edukado, lernadojn kaj edukadajn manierojn inkluzive ilian longatempan tradician gvidmanieron, subtenojn por fondo de programo kaj edukejo akcelanta la lingvan programon, gvidi ilian lingvon.

21条には、日本に関するものが書いています。

La 21-a agado estas prijapana jene.

日本政府がアイヌ民族と協力して国連先住民族の権利宣言を日本国内法として採択し、実施し、アイヌ民族を先住民族として認識した決議を拡大し明確化するため、具体的な活動や政策改正を行うように提言しています。

La japana registaro adoptu la Deklaracion de UNoj kiel la nacian leĝon kunlaborante kun ajnua popolo, apliku tion kaj faru la konkretan agadon kaj amendon de politiko, por disvastigi kaj klarigi la rezolucion por agnoski indigenecon de ajnua popolo.

また、この決議をさらに審議する目的で設立された有識者懇談会の委員8名の中にアイヌ民族が1名しか含まれていないことに抗議し、この有識者懇談会の委員の少なくとも半数をアイヌ民族によって構成するように提言しています。

Kaj ili protestas kontraŭ, ke nur unu ajnuan inkluzivas 8 komitatanoj de klerula interparola kunsido establita por plie konsideri la rezolu-

cion. Kaj ili proponas, ke la registaro faru, ke almenaŭ duono de komitatanoj de la kunsido estu ajnuaj.

先住民族として「先住民族の権利に関する国連宣言」を実施し、先住民族間ならびに他の支援団体やNGO との連帯の強化についても確認しています。

Ili konfirmis agi laŭ la Deklaracio de UNoj kiel indigenaj popoloj kaj fortigi soliarecon inter ili kaj aliaj subtenaj grupoj kaj Ne-Registaraj Oeganizoj.

言語については、6 条にあります。

La 6-a konfirmo estas prilingva jene.

世界から先住民族の言語が消えてしまうのを止めるため、マオリやその他の民族の経験を活かし、先住民族が自分の言語を流暢に話せるよう指導する「言語の鳥の巣学校」のような場の普及を目指しています。

Ili celas disvastigon de ejoj kiel 'birdnesta lernejo por lingvo', en kiu indigenaj popoloj estas gvidataj por, ke ili facile parolu sian lingvon laŭ sperto de maoriaj kaj aliaj popoloj, por ĉesigi malaperon de iliaj lingvoj en la mondo.

結語として以下のようなことばがありました。

Troviĝas jenaj vortoj kiel konkludo.

国連宣言の履行は、先住民族のみならずその他の人々や地球にとっても良いことである。

Plenumo de la Deklaracio de UNoj estas tre bona por ne nur indigenaj popoloj sed ankaŭ aliaj popoloj kaj la terглоbo.

先住民族が地球に、そして人間だけではなく植物、動物、その他の全ての生き物に持続可能に配慮するやり方を続けられれば、これは全体への恩恵となる。

Se indigenaj popoloj povos kontinui sian manieron, zorgi pri daŭrigebleco por la terглоbo kaj plantoj, animaloj kaj aliaj tutaj vivajoj, ne nur homoj, tio estas favoro al tuto.

彼らが自分の言語を話し、この多様な文化を持ち続けられたなら、世界の文化遺産はより豊かになるであろう。

Se ili povos paroli sian lingvon kaj kontinui havi diversajn kulturojn, la kulturaj heredaĵoj en la mondo fariĝos pli riĉaj.

彼らの多様な経済的、文化的、精神的、社会的、政治的システムが優勢勢力と共存できれば、彼らの子供に、そして孫に、さらに多様で希望のある未来を残すことが可能である。

Se iliaj diversaj ekonomiaj, kulturaj, spiritaj, sociaj, politikaj sistemoj povos kunesti kun supera potenco, ili povos restigi pli diversajn esperigajn futurojn al siaj infanoj kaj nepoj.

LA OLDULO kaj LA MARO

老人と海

原 作 Earnest Hemingway

エスペラント訳 Fernando de Diego

和 訳 後藤 義治

この作品もいつか SESで読んでいたと思うが、その時の問題点の指摘などが入れば、これから読む人にも参考になるでしょう。— La red.

### まえがき

札幌エスペラント会 後藤義治

今回はアメリカの文豪アーネスト・ヘミングウェイの代表作「老人と海」を紹介します。ヘミングウェイは1899年 イリノイ州オーク・パークで生まれました。高校を卒業後、記者をしたり、軍隊に志願して傷病兵の輸送に当たったりした。その後シカゴの作家アンダーソンに影響され、作家を志し、1926年「日はまた昇る」で頭角を現し、1929年「武器よさらば」で作家としての基礎を固めた。だがその後彼の性格をめぐって批判が相次いだ。1940年にスペインの内乱を活写した「誰がために鐘は鳴る」を出版、世界的なベストセラーになった。カリブ海の釣り三昧が1952年「老人と海」として結実した。この作品で1954年ノーベル賞を受賞したが7年後猟銃で自殺した。

今まではエスペラントの訳文から孫訳して参考に併記してきましたが、今回は原文を和訳は後藤が、エスペラント文にはブラジル・エスペラント連盟の Fernando de Diego が訳出したものです、読み比べてみてください。

## THE OLDMAN AND THE SEA

He looked across the sea and knew how alone he was now. But he could see the prisms in the deep dark water and the line stretching ahead and the strange undulation of the calm. The clouds were building up now for the trade wind and he looked ahead and saw a flight of wild ducks etching themselves against the sky over the water, then blurring, then etching again and he knew no man was ever alone on the sea.

### 老人と海

老人は海のかなたに眼をやりながら、今いかに孤独かを味わっていた。でも深遠な水の中にも、分光の彩やかな色が見えた。前の方に釣り縄が伸び、その先には穏やかで妙な潮のうねりがあった。モンスーンが入道雲を造りだし、向こうの海上にはゴメが飛んでいた。ゴメはエッチングのようにクッキリた背景を描き、臙に霞んだりまた鮮やかさを取り戻したりしていた。海の上は男にとって孤独な場所ではないと改めて感じた。

### *La OLDULO kaj La MARO*

Li glitigis la rigardon sur la maro kaj konsciis sian solecon. Sed distingis ankoraŭ la prismojn en la profunda, malhela akvo, la ŝnuron streĉitan ĉe la pruo kaj la strangan ondetadon de la kalma maro. La nuboj kumuligis pro la alizea vento, kaj aro da sovaĝaj anseroj profiligis kontraŭ la ĉielo, poste formis specon de malpreciza makulo kaj, poste, denove, akran konturon. Kaj tiam la olda konsciis, ke neniam oni estas absolute sola sur la maro.

He thought of how some men feared being out of sight of land in a small boat and knew they were right in the months of sudden bad weather. But now they were in hurricane months and, when there are no hurricanes, the weather of hurricane months is the best of all the year.

小舟で沖に漕ぎ出し陸地が視界から消えた途端怖気づく奴がいるが、天気が急変する季節ならいざ知らず、今は台風シーズンだ。そいつが来ないときゃ、一年中で絶好の釣り日和だべ。

Li pensis, ke iuj homoj, kiam surboate, timas perdi el la vido la firman teron. Tio kompreneblas en la monatoj de subite malbona vetero. Sed

nun estis la uragan-sezono, la plej bela de la jaro dum ne okazas uraganoj

If there is a hurricane you always see the signs of it in the sky for days ahead, if you are at sea. They do not see it ashore because they do not know what to look for, he thought. The land must make a difference too, in the shape of clouds. But we have no hurricane coming now.

台風が来るときゃ、海の上ならザーと前から空に嵐の兆候が出るわな。浜では無理だべ。どうしてだって、俺も考げえて見たさ、だが何を見てどう決めたらいいか判らずじめえよ。だがな、おめえ陸だって雲の形に違いが出るかも知んねい。んでもな、今はな、台風なんて来やしねえんだよ。

Kelkajn tagojn antaŭ la formiĝo de uragano, ĝi riveligas pere de diversaj signoj sur la ĉielo, se oni estas sursipe. De sur la firma tero, tiaj signoj ne percepteblas, ĉar oni ne scias kien rigardi. Krome la nuboj havas alian formon, se vidataj de sur la tero. Sed nun ne estis signoj de uragano.

Hi looked at the sky and saw the white cumulus built like friendly piles of ice cream and high above were the thin feathers of the cirrus against the high September sky.

"Light *brisa*" he said. "Better weather for me than for you, fish."

His left hand was still cramped, but he was unknitting it slowly.

老人が空を見上げると、サービス満点なソフトクリームのように、うず高く盛り上げた真っ白い積雲が見えた。天辺は透き通った羽毛の絹雲になって、天高く九月の空にそびえていた。

「風だ」老人はつぶやいた。「な！ 魚よ、てめえより俺に謎え向きの風だべ」

左手はまだ引き攣ったままだが、老人はゆっくりと揉み解し始めた。

Li levis la rigardon al la ĉielo kaj vidis la blankajn kumulusojn en la formo de bongustaj, gigantoj krem-glaciaĵoj. Pli alte, delikataj cirusplumoj karesis la septembran ĉielon.

《Milda *brisa*》 li diris. 《La vetero pli favoras min ol vin, fiŝo.》

Lia maldekstra mano estis ankoraŭ kramfa, sed iom post iom reduktiĝis ĝia rigideco.

I hate a cramp, he thought. It is a treachery of one's own body. It is

humiliating before others to have a diarrhoea from ptomaine poisoning or to vomit from it. But a cramp, he thought of it as a *calambre*, humiliates oneself especially when one is alone.

If the boy were here he could rub it for me and loosen it down from the forearm, he thought. But it will loosen up.

引き攀りはたまらんと思った。だが自業自得だ、全く面目ねえ。知らねえ人を前にしてフトメイン(腐敗毒)中毒でウンコをもらしたり、ヘドを吐いたりする様なもんだべ。しかし引き攀りはコムラ返りて思い出したが、吾ながらサマにならねえ、特に一人でいるときはなあ。

あのガキがいてくれたら揉んでくれたらうに、前腕(手首から肘まで)くらいは解れたらうに。ま、絞って置いても活るべ。

"Āĉaj kramfoj" li pensis "Ili kvazaŭ perfidas la korpon. Antaŭ aliaj personoj estas humilige suferi je mallakso aŭ vomoj, sed kramfoj (kiujn li nomis *calambres*) humiligas onin, ĉefe kiam oni solas.

Se la knabo estus ĉi tie, li frotadus al mi la manon ekde la antaŭbrako kaj redonus al ĝi la movon. Sed iel ain ĝi perdos sian rigidon per si mem."

Then, with his right hand he felt the difference in the pull of the line before he saw the slant change in the water. Then, as he leaned against the line and slapped his left hand hard and fast against his thigh he saw the line slanting slowly upward.

"He's coming up," he said. "Come on, hand. Please come on."

その時、老人の右手にアタリの感触があった、水中の釣り縄の角度が変わっている、すぐに胸をぞらし釣り縄を引きつけた。腿に左手を急いで激しく打ちつけた。釣り縄の角度は小さくなって揚がってくるのが判った。

「来い！ さあ来い」彼は気合を入れた。「活ってくれ、頼む。元の手になんてくれ」

Tiam li sentis per la dekstra mano sanĝon en la tiro de la snuro antaŭ ol li rimarkis ĝian novan klinon en la akvo. Dum li aplikis sian tutan energion kontraŭ la ŝnuro, li forte batis al si sur la femuron per la maldekstra mano. La ŝnuro malkliniĝis iom post iom.

«Ĝi supreniĝas» li diris. «Nu, mano, utilu denove!»

The line rose slowly and steadily and then the surface of the ocean bulged ahead of the boat and the fish came out. He came out unendingly and water

4

poured from his sides. He was bright in the sun and his head and back were dark purple and in the sun the stripes on his sides showed wide and a light lavender. His sword was as long a baseball bat and tapered like a rapier and he rose his full length from the water and then re-entered it, smoothly, like a diver and the old man saw the great scythe-blade of his tail go under and the line commenced to race out.

釣り縄はゆっくりと確実に上がって来た、すぐに船先の海面がぐいと盛り上がって、全身ではないが魚は姿を現した。両脇腹に水が当たって砕けた。陽の光を浴びて頭と背は濃い紫色に輝き、横腹の広い鱗は太陽の下で薄紫に光っていた。嘴は野球のバットぐらいあって、先端は細く尖って剣のようだ、魚は水上に躍り出るやダイバーのように、すばやく水中に姿を消した。老人は大鎌形の尾が水中に入るのを眼にした、釣り縄はまたしもスルスルと手のひらを走り出した。

La ŝnuro leviĝis malrapide sed konstante, ĝis la maro subite kurbiĝis antaŭ la boato, kaj la fiŝego ekaperis. Ĝia poioma montriĝo ŝajnis ne havi finon, dum la akvo glitis de ĝiaj flankoj. Ĝi briilis en la suno, ĝiaj kapo kaj derso vidiĝis malhele purpuraj, kaj la larĝaj strioj de ĝiaj flankoj montris koloron ruĝete bluan. Ĝia nazo estis longa, kiel basbala batilo kaj pinta kiel rapiro. La fiŝego fine aperis en sia tuta longo kaj tuj mergiĝis en la akvon kun la facilto de plonĝisto. La olda vidis malaperi ĝian voston, similan al granda klingo falĉila, kaj tuj la ŝnuro komencis rapidegi.

"He is two feet longer than the skiff," the old man said. The line was going out fast but steadily and the fish was not panicked. The old man was trying with hands to keep the line just inside of breaking strength. He knew that if he could not slow the fish with a steady pressure the fish could take out all the line and break it.

「奴は俺の舟より二尺は大きかったな」と老人は思った。釣り縄は手際よく繰り出された、こいつはたいした野郎だ。釣り縄を張力いっぱいの処で巧みに操りながら、しっかりと手綱を捌くように魚を泳がせねば、縄を全部繰り出した拳匂、引きちぎられるのが落ちだ。老人は一本釣りのコツを熟知していた。

"Ĝi estas du futojn pli longa ol la boato" diris la olda. La ŝnuro elvolviĝis rapide sed regule, kaj la fiŝo ne rivelis timon. Li klopodis teni ambaŭmane la ŝnuron streĉa, ĝuste sub la rompiĝo-limo. Li sciis, ke se li ne povos malakceli la fiŝon per konstanta kontraŭtirado, la fiŝo kapablos elĉerpi la tutan ŝnuron kaj rompi ĝin.

\*センター通信：2008年6月30日、第256号、名古屋エスペラントセンターB5 X10頁、日本文。第57回東海エスペラント大会、センター総会の記事。

\*R0mazi Kenky0; Dai 9-g0, 2008-07-01, Nippon R0mazi Kenky0 Ky0kai (=NRKK) 発行、B5 X8頁、日本語、一部ローマ字。最初と最後の頁にカラー写真が入った。日本兵捕虜の学校「大同学園」(KIRYU Zyunz0)が連載開始。これは日中戦争中、中国が西安に設けたもの。

\*Eskalo 第127号(2008年第3号)、2008年7月2日、川崎E.会、B5X8頁、日本語。2月11日放映された「失くした二つのリンゴ」の感想(p.5)には番組内容への誤解があるようだ。

「ニューヨークでエスペラントを使う(Maki Sano)」はLa Movadoから転載。

\*NOVA VOJO: N-ro 442 julio 2008 EPA (エスペラント普及会)、A5 X36頁中E文6頁。会員名簿に北海道から高山利夫、梶谷豊、田村佐登子、三井優子、高山清人、會田清美、広田茂、佐々木喜一、高山勲、佐久間和夫(敬称略)の名がある。人類愛善会ビル完成など、2年後アジア大会が開かれるモンゴル関係の記事が多い。

\*Ponteto/ (Bulteno de Esperanto-Ligo en Regiono Kantoo: 関東エスペラント連盟)/ Julio 2008 N-ro 229; B5 X12頁、の内E.文は引用10行のみ。堀泰雄のモンゴル旅行記、内容豊富。

温暖化で消えかかった氷河の近くの草原にはナキウサギが住み、アイヌのムックリと全く同じ口琴が伝わっている。

\*Mejlŝtono 2008 julio N-ro 208, 仙台E会: B5X16 頁中E.文は引用文十数行。「寄付金付き切手の生みの親土井英一」(後藤齊)は詩人土井晩翠の長男でエスペランチストだった英一についての11頁にわたる記録。

\*Al Vi Kara; N-ro 95, julio 2008, Kioto-Esperanto-Societo, B5X20頁のうちE.文10頁強。そのうち4頁は6月の第56回関西エスペラント大会の写真集。表紙の写真は祇園祭、その説明はE.文で16~17頁にある。

\*受講生通信 第119号, 2008-08-01, 沼津エスペラント会, B5X10 頁の内E.文合計1頁。「受講生のお便り」には「この数週間は洞爺湖での反G8行動のためお休みですが7月から再開—」もある。「地球語エスペラント」(チラシ、A4X4頁)同封。

\*La Movado; KLEG (関西エスペラント連盟) 発行、N-ro 690 aŭg. 2008, B5 X20 頁のうちE.文3頁半。Vizito al la tombo de Verda Majo(LEE Jung-Kee)は5月ハルビンで開かれたLa 5-a Esperanto-Kongreso de Nordoriento de Ĉinioの際のチャムス訪問記。長谷川テルの墓にエスペラント表記をつけるべきだ、と主張している。

[第7回委員会報告] Protokolo de la 7-a Komitato Kunsido

日時：2008年 6月28日 (土) 13:20 ~15:40

場所：札幌市北区北8条西3丁目 札幌エルプラザ 4階

札幌市男女共同参画研究室 3番

出席：阿部、川合、後藤、佐藤英治、椿、横山、星田 (記録)

欠席：佐藤不二雄、須藤、中田、大山口

議事

\*組織：HELと地方組織の関係について検討

昭和初期(1920年代)道内各地に生まれた地方会が1932年第1回北海道エスペラント大会を開き、北海道エスペラント連盟を組織した。

加入単位は地方会で、所属地方会のない希望者は「無所属会員」として個人加入も認めていた。関西エスペラント連盟(KLEG, 1951年結成)も組織原則は同じだった。現在のHEL規約でも「団体会員」「個人会員」の名は残っているが、当初の歴史は忘れられ、「個人の自由意志による加盟」と理解されている。

この点なお討議は必要だが、当面現状のまま北海道全体を対象とする運動機関の意義を理解してもらうように努める。

\*広報(HP)：アクセス数 59198件(1998.11.19以来)。掲示板(よろず相談室)には最近新人からの書き込みも入っている。

\*メールマガジン：6月27日 116号発行、部数1039。今年に入ってずっと千部以上を維持、伸びている。

\*情報・宣伝(マスコミ関係など)：HELには関係ないが

Libera Esperanto-Asocio de Hokkaido の反G8-Pinta Konferenco 活動については外国メディア(英国 New Statesman, ドイツ Der Spiegel など)に出ている。

マスコミの「行事情報」投稿について

朝日新聞：3週間以上前に通知が必要。

道新「イベントウィークリー」：毎週木曜日朝刊に、その日から1週間分の行事を載せている。北海道新聞ホームページの「北海道イベントカレンダー」<http://event.hokkaido-np.co.jp/>でも道内各地のイベントを紹介。

\*教育・研究

札幌：入門講習に S-ino 浜屋(5月合宿に参加)が出席。[追記：読書コースは La Fremduloを終わり(7月26日)次から Viktimoj(Julio Baghy)を読む]

苫小牧：5月13日から入門講習を計画。電話での問い合わせはあったが参加者なし。初等コースは La Teksto Dua, 読書コースは La Vojaĝo en Esperanto-

Lando を読んでいます。

\*機関誌：6月28日 Heroldo de HEL No.119 を発行。110部。

\*北海道大会/年間計画

国際言語年、国会のアイヌ先住民承認に関連したテーマ、催しを考えたい。

アイヌタイムズの野本会長に講演を依頼してみる（横山）。

\*「おハコとばねる」団体活動発表・紹介展 に参加

場所：札幌エルプラザ（開館5周年記念行事）〔4階・研修室4〕

日時：9月20日（土）11時～16時

準備：当日 8：45 ～11時

\*次回委員会

8月 9日 13時から 札幌エルプラザ（場所未定）

なお同日 10時から 市民活動サポートセンター印刷室で機関誌印刷。

\*\*\*\*\*

[編集後記/Redaktanto parolas ...]

\*今回の編集は綱渡り。Danke ricevitaj, 委員会報告、編集後記（これは余ったスペースにを埋めるもの）は私の担当のようになっており、7月下旬まとめにかかって気がつくとはかの原稿がない。あわてて「皆さん（会員から）の原稿が来ていません、皆さん、書いてもらえませんか」とメールを出したのが7月25日。

\*翌日から「以前発表したが転用OK」の連絡に続き、「市民サミット」、「先住民サミット」などの原稿が次々に入電。文学作品紹介原稿は郵便で到着、何とか分量は十分、ただし原稿文 korektoの意見も交錯し、ちょっと忙しいことに。

\*Tamen, koran dankon por c'iuuj samideanece helpemaj!

\*（日本語でもエスペラントでも）自由に思うことを書いてみませんか。（エスペラントで）やっていること、やりたいこと、やりたいがうまく行かないこと、その問題点、など――

\*沖に奥尻島を望む漁村のFさんから手紙。R.O 8-9月号で見た La vojaĝo en E.-Lando（苫小牧の中級で使用）を入手したいとのこと、すぐ手配しました。「先般嵐山合宿に参加――、学校を回ってエスペラントのことを話してみた――」など、人知れず努力されているのに驚きました。こんどなにか原稿でもお願いしましょうか。

\*\*\*\*\*

北海道エスペラント連盟 会費/年

正会員 3000円、青年会員（26歳未満） 1500円、

購読会員 2000円、家族会員 1000円